

Eŭropa Bulteno

Marto 2016, Numero 158

LINGVAJ ASPEKTOJ DE EU POST LA BRUSELA TRAGEDIO



Post la 22-a de marto Bruselo komplete ŝanĝiĝis. En ĝi regas timo, ĉie svarmas polico kaj kontrolas ĉiujn. La konata tolera mondo en la centro de EU definitive ŝanĝiĝis al suspekta kaj timiga loko. Kaj sian rolon tie ĉiam pli klare montras ankaŭ la lingva problemo. Du-tri tagojn pli poste la polico pafvundis personon de alirasa aspekto pro tio ke li ne komprenis la franclingvan postulon demeti la jakon kaj levi la brakojn.

Poste aperis informo ke la polico en proksima Mechelen en Flandrio konis la adreson de Salah Abdeslam, sed la tiea polico ne informis pri tio dum pluraj monatoj la bruselan policon, laŭdire pro la lingvaj diferencoj pro kiuj la flandraj kaj franclingvaj policoj preskaŭ ne kunlaboras.

Jen nur du ekzemploj pri problemoj kaŭzataj de neekzisto de komuna lingvo kiun parolus kaj komprenus ĉiuj eŭropanoj. Sed kiu en la nuna kaoso povas komprenigi al la nun paranoigitaj regantoj komenci konstrui novan EU en kiu ĉiuj fidus unuj al aliaj kaj ne kreus getoojn kaj sin reciproke izolus unuj de aliaj?

Zlatko Tišljarić

BRITA KONGRESO DE ESPERANTO 2016 EN LIVERPULO

De la 18a ĝis la 20a de marto 2016 okazis en urbo Liverpulo (Britio), en la kongresejo "Gateway Centre", la ĉi-jara Brita Kongreso de Esperanto, kun 61 partoprenantoj el 10 landoj. En la programo aparte rolis gastpreleganto Kalle Kniivilä kun du prelegoj (unu pri sia libro "Homoj de Putin" kiujn eblis aĉeti kun lia subskribo, kaj plia pri "Nepoj de Sovetio", lia nun prilaborata libro pri la ruslingva minoritato en la baltiaj landoj).



Sed estis ankaŭ pliaj programeroj pri plej diversaj temoj: de la loka dialekto "skaŭsa" ("Scouse") ĝis la lando kaj E-movado de Brazilo; de fruaj britaj pioniroj Edith Alleyne Sinnott kaj Harold Bolingbroke Mudie ĝis la nun prilaborata nova retejo de Esperanto-Asocio de Britio. Evidente ankaŭ ne mankis distraj eroj, kiel amuzaj kvizoj (unu de Tim Owen por la ĉeestantoj, pli poste alia de Rolf Fantom por pluraj partoprenantoj sur la podio, kiun gajnis Kalle Kniivilä per fin(n)a venko), muzikaj sesioj kaj kanto-konkurso kun kantoj de la famaj "Beatles", kiuj ja venis el Liverpulo. Krome estis

ankaŭ lingvokursoj por komencantoj sub gvido de Anna Löwenstein, EAB-kunveno kun elekto de nova estraro (estis kvin kandidatoj: Ian Carter, Edmund Grimley Evans, Clare Hunter, Ed Robertson, Tim Owen; ĉiuj elektigis) kaj libroservo. Je la fino de la evento Helen Fantom estis honorigita pro sia senlaca aktiveco por Esperanto dum pluraj jardekoj.

Lige al tiu-ĉi kongreso okazis samurbe ankaŭ la 2a "John Buchanan Masterclass" (16a-18a de marto) en la Universitato de Liverpulo pri Esperanta lingvo, kulturo, gramatiko kaj literaturo, parte en la angla, parte en Esperanto. Ĝi estas nomita laŭ brita Esperantisto kiu starigis fondaĵon ĉe tiu Universitato en 1930 por antaŭenigi scipovon kaj uzon de Esperanto.



La venontjara Brita Esperanto-Kongreso okazos en Edinburgo. Kiu ne emas atendi ĝin, tiu povos viziti ekz. la 11an Skotan Kongreson jam ĉi-jare (10a-12a de junio 2016) en Glasgovo, aŭ la 2an Tutkeltan Kongreson resp. la 20ajn Pluezekajn Renkontiĝojn (13a-20a de aŭgusto 2016) en Pluezeko.

Sandra Schweder

MICHAEL CWIK (1940 -2016)

Delonga membro kaj estrarano de Brusela Esperanto-Klubo, Michael CWIK forpasis lundon la 29an de februaro 2016 pro grava sango-malsano. Li estis konscia ĝis la lasta momento kaj aktiva ĝis kelkaj tagoj antaŭ la fino. Li ankoraŭ faris prelegon en nia Komisiona kunveno la 10an de Februaro pri «Kio mankas en la mona unio de EU?», kaj eĉ partoprenis poste semajnfinan konferencon en Berlino!

Michael Dieter Cwik estis germana esperantisto de pluraj jardekoj vivanta en Belgio (komence en Bruselo kaj poste apude, en Tervuren). Naskita en Hamburgo la 29-an de aprilo 1940, do en unu el la plej nigraj fazoj de la eŭropa historio, kaj kreskinta en la komence mizeraj sed esperplenaj jaroj de la rekonstruado, li fervore engaĝiĝis de frue en diversaj aspektoj de la strebado al eŭropa unueco (Eŭropa Movado, Federalistoj...), kaj ankaŭ el tiu vidpunkto

aliris Esperanton. Ankaŭ profesie li estis oficisto de la Eŭropa Komisiono en Bruselo, kaj antaŭ tio staĝis tie en sia junaĝo, poste plu helpante kunordigi agadon de la komisionaj (eks)staĝantoj.

En 1983 li organizis lingvo- kaj komunikad-eksperimenton kun sep kolegoj responde al la demando ĉu oni vere povas akiri bazan komunikad-eblecon en planlingvo kiel Esperanto ene de dusemajna feriado. La respondon li taksis jesa - Unusemajna kurso gvidita de Graham Leon-Smith el Londono kaj unu semajno da prelegoj kaj diskutoj en kvar-stela hotelo en la montara feriejo Windischgarten en Supra Aŭstrio) ebligis al la parteprenantoj diskuti pri komunaj temoj kaj aliĝi al la Brusela Esperanto-Grupo. En tiu epoko li fondis kune kun kolegoj en la eŭropaj institucioj lingvan rondon nomitan france Amis de la langue internationale Esperanto, dank'al kiu Bruselaj esperantistoj povis dum jaroj kunveni en la luksaj salonoj de la Eŭropa Komisiono. Krome li engaĝiĝis en la laboro de Eŭropa Esperanto-Unio kaj plurfoje (kun)organizis aranĝojn en la Eŭropa Parlamento. Li ankaŭ ofte prelegis en kluboj, seminarioj kaj kongresoj pri la Eŭropa Komunumo, federalismo, la Ekonomia kaj Mona Unio kaj lingvaj aspektoj de la Eŭropa projekto kaj verkis multajn artikolojn tiutemajn.

Li estis entombigita apud siaj gepatroj en Germanio. Funebra ceremonio memore al li okazis ĉe la germana evangeli-komunuma preĝejo Emmaus en Bruselo la 18-an de marto 2016.

Angelos Tsirimokos

PREPARKUNSIDO POR LA LINGVO-POLITIKA KONFERENCO DE LANDOJ V4+

La 31-an de marto 2016 okazis en Nitra preparakunsido por la lingvo-politika konferenco de landoj V4+ (Viŝegradaj landoj + samopiniantaj landoj) „Perspektivoj de lingva komunikado en EU“ en Nitra inter la 28a kaj 29-a de julio 2016, kiu okazos kiel malfermita faka aranĝo de la 101-a UK de Esperanto.

La preparakunsidon organizis Fakultato de Mezeŭropaj Studoj de Universitato de Konstanteno Filozofa en Nitra kunlabore kun partoprenanto de LKK por la konferenco. La kunsidon partoprenis reprezentantoj de partneraj universitatoj de V4 (Budapeŝto, Ĉeské Budejovice kaj Poznań). Partoprenantoj diskutis pri enhavo de la konferenco, t. e.. proponoj de bazaj dokumentoj por 3 ĉeftemoj de la konferenco: 1) Lingvaj problemoj de civitana partopreno; 2) Ekonomia integriĝo de unuopaj ŝtatoj en EU; 3) Stato kaj perspektivoj de fremdlingva instruado/lernado en EU. En la dua parto de la kunsido estis diskutitaj logistikaj kaj organizaj aferoj kaj oni vizitis/trarigardis salonojn, en kiuj okazos la konferenco.

La konferenco okazos, kiel aranĝo de la Prezidenteco de Slovakio en EU Konsilio, organizita de neregistaraj organizoj. Ĝi okazos sub aŭspicio de Miroslav Lajčák, Vic-ĉefministro kaj ministro de eksterlandaj kaj eŭropaj aferoj de Slovakio. Kiel ĉefparolantoj la konferencon malfermos tri EU komisionanoj, du aktualaj Tibor Navracsics (HU), Vytenis Andriukaitis (LT) kaj unu eksa komisionano Ján Figel' (SK), kiu havis tiun postenon de 2004-2009. Dum la konferenco la unuan fojon sidos ĉe la konferenca tablo kaj komune diskutos pri lingvaj problemoj en EU politikistoj, lingvistoj kaj reprezentantoj de civitanoj por serĉi justajn, egalrajtajn kaj efikajn solvojn, kiuj estos akcepteblaj por ĉiuj civitanoj kaj de V4+ landoj, sed ankaŭ por aliaj EU landoj.

Jozef Reinart

Sekretario de LKK por eksterlandaj, diplomaciaj kaj fakaj rilatoj

LA 101-A UK INVITAS

Junulara programo de la 101-a UK: riĉa kaj ĉeestinda!

La junulara programo estos parto de 101-a Universala kongreso de Esperanto en Nitra, kiu okazos de la 23-a ĝis 30-a de julio 2016. La junulara programo estos preparita por ĉiuj aĝaj



kategorioj, vi devas plenumi nur unu kondiĉon – senti vin juna spirite. Se vi naskiĝis post la 31-a de decembro 1995, vi eĉ ne pagas aliĝkotizon!

La ĉeftemo de Junulara programo estos “La gejunuloj al la plenkreskuloj – la plenkreskuloj al la gejunuloj”. Ĝi signifas, ke ankaŭ ĉi-jare la junuloj preparis interesajn

programerojn, ne nur por junuloj, sed por ĉiuj, kiuj sentas sin junaj. Ni kun ĝojo ludos, kantos, sportumos, bambumos, ekskursos, sed ankaŭ helpos unu la alian kompreni teknikaĵojn, lingvaĵojn aŭ efikan labormanieron kaj multajn aliajn aferojn dum niaj prelegetoj, kursetoj kaj trejnadoj. Aŭ ni simple babilos vespere en la drinkejo kun ĉiuj, kies aĝo pro la senĉesa kurado de tempo superas la aĝon de oficiala juneco.

Programo

La pagendajn programerojn eblas mendi en la reta mendilo de UEA (<http://uea.org/kongresoj/mendilo>) Ilia kodo estas indikita apud la titolo. Nepre mendu ilin, se vi volas partopreni, la lokoj estas limigitaj!

Jen la plej gravaj aferoj, pri kiuj vi sciu nepre jam nun:

Trinkomanĝa nokto (23.7.2016)

Ni kore invitas vin partopreni la trinkomanĝan nokton tuj la unuan vesperon! Ĉiuj, kiuj ne ŝatas enlitiĝi tro frue kaj preferas babili kun samideanoj jam dum la unua vespero de la kongreso, kunportu viajn naciajn manĝaĵojn kaj/aŭ drinkaĵojn kaj prezentu ilin, kundividu kun aliaj dum tiu ĉi programero! Ni jam antaŭĝojas ekkoni viajn specialaĵojn.

Vingustumado (25.7.2016, kontraŭ 7 eŭroj, 19:00-21:00) – D10

Ĉu ne eblas por vi elspezi tiom da mono por la bankedo aŭ simple vi ne tiom ŝatas tiuspecan programeron? Ne gravas! Ni pretigis alternativan amuziĝon antaŭ la balo: venu vingustumi kun ni! Vi havos eblon provi diversajn kvalitajn lokajn vinojn kaj nur tie vi ekscios, kion signifas slovake “jednohubka”. :) Sekve ni plu amuziĝos kune dum la kongresa balo.

Verda pikniko (27.7.2016, kontraŭ 7 eŭroj, 19:00-21:00) – D11

Ni preparas por vi neforgeseblan esperantan piknikumadon sur la herbejo apud la studenthejmo. Ni pretigos por vi manĝaĵojn, tukojn kaj ankaŭ trankvilajn koncertojn, por ke vi povu pli profunde ĝui la spiriton de la piknikumado. Kontraŭ la kotizo vi ricevos kuponojn por manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, kiujn la organizantoj disdonos al vi surloke.

Junulara ekskurso al Bratislavo (27.7.2016, kontraŭ 10 eŭroj, 8:30-18:00 horo) – E10

Ni ankaŭ pensis pri junuloj, kiuj ŝatus viziti la ĉefurbon de Slovakio kontraŭ favora prezo. Memkompreneble ni supreniros la Bratislavan kastelon, vizitos la centron de la urbo kaj vi ricevos ankaŭ tempon por mem ekkoni la urbon. La ekskurso estos piedira dum la tuta tago en la urbo kaj la nombro de partoprenantoj estos limigita. (Prioritaton havas gejunuloj, se restos liberaj lokoj ni vendos la ceterajn biletojn surloke en la budo de la junulara programo dum la movada foiro al la unuaj, kiuj venos al ĝi. :)

Junulara senpaga piedekskurso al la monto Zobor (27.7.2016, 10:00-14:30 horo)

Ĉu vi estas sportema aŭ simple ŝatas naturon kaj promenojn en ĝi? Tiukaze tiu ĉi ekskurso estas tre taŭga por vi! La monto Zobor superstaras la urbon Nitro kaj ofertas tre belan panoramon al la tuta urbo kaj ties ĉirkaŭaĵo. Survoje oni praktikos geokaŝadon. Ekipu vin per bonaj ŝuoj, akvo kaj sunokulvitroj. :)

Koncertoj

- Barbora Hazuchová – Fama slovaka kantistino, kiu partoprenis konkurson nomata “Superstar” kaj ŝi estis inter 8 la plej bonaj kantistoj el Ĉeĥio kaj Slovakio.
- Easy Steps – Rok-grupo de Ĉeĥio, kiu ofte kantas kaj ludas ĉiujn famajn kantojn de la mondo, sed ili ankaŭ havas siajn proprajn kantojn.
- Asorti kaj Martin Wiese

Aliaj programeroj

Danckursoj – Dum la tuta aranĝo vi povos partopreni interesajn danckursojn (popolajn, tradiciajn slovakajn, ĉardaŝon...).

Sportumado – Vi ankaŭ havos eblon partopreni diversajn programerojn gvidatajn de ĉarmaj junaj sportistoj. Krom la tradicia piedpilkumado ĉi-jare ne mankos la klakig-teamo kun

preskaŭ ĉiutagaj praktikoj.

Trejnadoj kaj prelegoj – ĉu vi ŝatas labori en laborgrupoj aŭ simple aŭskulti fakajn prelegojn de junuloj? Dum la junulara programo de UK 2016 eblos partopreni ankaŭ tiaĵojn. Pro nia ĉeftemo “La gejunuloj al la plenkreskuloj – la plenkreskuloj al la gejunuloj” ni ankaŭ pretigas por la plenkreskuloj kursetojn pri komputilumado kaj saĝtelefonuzado. Venu, se tio interesas vin!

Pli da informoj pri la Junulara programo de la 101-a UK:

<http://www.nitra2016.sk/junulara-programo/>

SKEJ-teamo

ĈIUTAGE 30 HOMOJ FINAS LA ESPERANTO-KURSON ĈE DUOLINGO PER KIU JAM LERNIS ESPERANTON 340.000 PERSONOJ KONANTAJ LA ANGLAN

La kvanto de registritaj eklernantoj en la anglalingva reta Esperanto-kurso ĉe Duolingo jam superis 340.000 homojn. Finstudas ĝin kompreneble nur malgranda parto de ili, sed eĉ tiel ĉiutage ĉ. 30 homoj atingas la finon de la kurso.

Ĉi-jare laŭplane estos lanĉita kurso por hispan-lingvanoj. En postaj jaroj estas planataj kursoj interalie por ruslingvanoj kaj ĉinlingvanoj...

Pli detale vi povas legi en la intervjuo kun Chuck Smith ĉe <http://www.liberafolio.org/>

Novajŝervo RET-INFO/Lingvo-Studio

JAM 180 ALIĜINTOJ POR LA GERMANA ESPERANTO-KONGRESO EN MUNKENO DE LA 13-A ĜIS LA 16-A DE MAJO

Pli kaj pli da homoj aliĝas al la ĉi-jara Germana Esperanto-Kongreso en la bavara ĉefurbo en suda Germanio. En la listo de aliĝintoj troviĝas jam pli ol 180 homoj, inter ili trideko da homoj el eksterlando. Entute temas pri 16 diversaj landoj: Nederlando, Brito, Danio, Aŭstrio, Italio, Francio, Portugalio, Pollando, Ĉeĥio, Slovakio, Hungario, Kroatio, Rusio, Ukrainio, Usono kaj Brazilo.

125-a jubileo de la Munkena Esperanto-klubo

Aktuala okazo por la kongreso en Munkeno estas la ĉi-jara 125-jara jubileo de Esperanto en Munkeno - la "Societo Esperantista München" estis fondita la 3-an de januaro 1891. Por aparte festi la jubileon la Munkena klubo invitas al festa kunveno en la unua kongresa vespero.

<https://www.esperanto.de/eo/enhavo/vendredo-1352016>



"Ukrainio kaj Rusio - du ŝtatoj, ĉu fratoj?"
 En la programo estas diversaj prelegoj, ekzemple pri "Ukrainio kaj Rusio - du ŝtatoj, ĉu fratoj?" kaj "La Biblio en planlingvoj - de Volapuko ĝis Esperanto". Prelegos ankaŭ la sekretario de EEU Zlatko Tišljarič: » EUROPA IDENTECO - Kiel krei kondiĉojn en kiuj plimulto de eŭropanoj kredos sin sinceraj eŭropanoj?«

Koncertos Kajto kaj Attila Schimmer

Koncertas en Munkeno la konata grupo Kajto el Nederlando (sabaton) kaj la aŭstro Attila Schimmer en la dimanĉa vespero.

Ekskursi al Munkeno kaj ĉirkaŭaĵo

Por konatiĝi kun Munkeno kaj ĉirkaŭaĵo okazos diversaj promenoj kaj ekskursoj: Oni vizitos la aŭtomobilan mondon de BMW, rigardos la Ludoviko-antaŭurbon kaj krome allogas ekzemple la malnova urbocentro, la secesia stilo kaj la Olimpia parko kun pacpreĝejo.

<https://www.esperanto.de/eo/gek2016/programo>

Renkontiĝu kun ni en Munkeno, urbo samtempe malnova kaj moderna!

Ne maltrafu la Germanan Esperanto-kongreson en Munkeno, malnova urbo samtempe tradicia kaj moderna. Urbo iom proksima de Ĉeĥio, Aŭstrio, Svislando kaj eĉ Italio kaj Francio. Festu la 125-an jubileon de la Esperanto-vivo en Munkeno kun ni ĉiuj en internacia rondo!

Jen la aliĝilo

<https://www.esperanto.de/de/civicrm/event/register?id=6&reset=1>

Sincerajn salutojn kaj koran bonvenon en Munkeno

Karl Breuninger kaj Uli Ender

PLI OL 170 KURSANOJ ĈE LINGVO-STUDIO EN BUDAPEŬTO

La nova jaro portis sukceson kaj ĝojigan rezulton por nia budapeŝta lingvolernejo Lingvo-Studio. En la unuaj du monatoj finiĝis tri Esperanto-kursoj kaj startis kvar novaj, ĉiuj po 14 lernantoj! Kun la pli frue komencitaj grupoj do en la klasĉambraj kursoj studas nun ĉe ni pli ol 70 homoj!

Simile sukcese startis la jaro ankaŭ ĉe la interreta lernejo. Ĉe Lingvo-Studio ni funkciigas PAGAN interretan Esperanto-kurson ("Lernu" estas iom simila al nia kurso), en tiu ĉi jaro aliĝis al ĝi kromaj 114 lernantoj, do en tiu ĉi jaro - dum la unuaj du monatoj - komencis lerni Esperanton ĉe ni entute ĉirkaŭ 170 homoj!

Lingvo-Studio estas unu el la plej grandaj lingvolernejoj en Esperantujo. La instruado okazas en tri lernoĉambroj en la Budapeŝta Esperanto-Centro, situanta en la centro de la urbo, tuj apud la metrostacio Klinikák. En la Lernejo laboras 4-5 instruistoj laŭ kontraktoj. La kursoj okazas en la vesperaj horoj.



En la lernejo ni uzas propre verkitan kaj eldonitan, (ĉu plej?) kompleksan instru-pakaĵon kun lernolibro de Szilvási, ekzerco-kajero, sonmaterialoj, komputila ekzerco-programo, interreta ekzerca programo, hejmtasko-folioj, krucvortenigmo, videaj filmetoj, muziktekstoj, k.c.

Novajfo, ke en februaro ni lanĉis ankaŭ novtipan grupon: 2-3 monata SENPAGA kurseto por refreŝigi la lingvo-scion por tiuj niaj eksaj kursanoj, kiuj pli frue jam sukcese pasis la lingvoekzamenon. La kurseto estas tre bonetosa, kaj ĝi donas la

esperon enigi la grupanojn en la Esperanto-movadon.

Sukceso de nia lernejo estas dankenda ĉefe al niaj instruistoj, kiuj faras sian laboron en alta profesia nivelo: Baloghné Fodor Éva, Berényi Csilla, Nagy Márk, Tóth Mária, Tötösné Gados Zsuzsa, Sz. Horváth Kata kaj aliaj.

Retejo de niaj lingvokursoj (klaku tie al la verda eo-flago): <http://www.eszperanto-tanfolyam.hu>

Szilvási László

ESPERANTISTAJ ENTREPRENOJ KUNLABORE KREIS NOVAN GRAVAN PROJEKTON

La 31-a de marto estis limdato por transdoni projektproponojn kadre de EU-financata programo Erasmus+ , interalie sur la kampo de lerneja agado. En porlerneja financa linio jam estis aprobitaj pluraj projektoj en kiuj kunlaboris lernejoj en kiuj infanoj lernis Esperanton, sed ĉefe temis pri malgrandaj nur porlernejaj projektoj. Nun la esperantistaj entreprenoj gvide de Maribora Inter-kulturo kreis konsorcion por granda kaj grava projekto por Esperanto sub la labornomo: Multlingva akcelilo.

Kaze ke la projekto estus akceptita en ĝi partoprenis krom Inter-kulturo, E@I el Slovakio, Studio Gaus el Berlino kaj Izvori el Zagrebo plus neesperantistaj instruorganizaĵoj sed kun esperantistaj helpantoj: 3 elementaj lernejoj (un en Kroatio, unu en Slovenio kaj unu en Bulgario kaj du universitatoj (Suddana Universitato en Odense kaj Universitato el Maribor (Slovenio)), do entute 9 partnerorganizoj.

Inter-kulturo, baze de la lastatempaj programoj kiujn evoluis Raymond Gerard, kiuj kapablas aŭtomate nombri morfemojn de esperantaj tekstoj kaj kalkuli kioman procenton de la tekstaro kovras la plej oftaj morfemoj, decidis ellabori projekton kiu ebligas fine konkretan manieron uzi limigitan parton de Esperanto por grave plirapidigi la lernadon de fremdlingvoj en la lernejoj. Temas pri tio ke jam de longe pluraj eksperimentoj de Szerdahely, Frank, Tišljár kaj

kelkaj aliaj pruvis ke Esperanto kiel unua lernita lingvo plirapidigas la postan lernadon de aliaj naciaj fremdlingvoj inter 25 kaj 30%. La lastaj esploroj de Gerard, montis ke 450 plej oftaj morfemoj kovras 95% de la tekstaro, sed ke nur 230 plej oftaj morfemoj kovras 90% de la tekstaro. Tiu konstato ebligis al mi aliri la menciitan projekton decidinte ke tiu multlingva akcelilo estos limigita Esperanto el nur 230 morfemoj.

La projekto celas evoluigi detalajn didaktikajn materialojn por instruistoj en elementaj lernejoj ie ajn en EU, kiuj ebligos instrui la modellingvon dum unu lerneja jaro tiel ke tiu scio efektive sendube plirapidigos la lernadon de aliaj fremdlingvoj. La celo estas havi didaktikajn materialojn per kiuj iu ajn instruisto post mallonga kelktaga seminario povas instrui tiun multlingvan akcelilon baze de la 230 plej oftaj morfemoj de Esperanto.

Projektplano kaze de aprobo:

Inter-kulturo gvidos la konsorcion kaj disdonos taskojn, la pedadogoj – instruistoj de fremdlingvoj en komencaj klasoj de elementaj lernejoj kun helpo de ekstera esperantisto evoluigos la didaktikaĵojn (bildajn ekzercojn, specialajn kantetojn, skeĉojn, konversaciajn frazojn, memorludojn por lerni vortojn), Dana Universitato evoluigos programon kiu aŭtomate kreas demandofrazojn kaj tiel anstataŭigos la kunparolanton por la lernantoj (ili ricevos de komputilo hejme konstante novajn demandojn al kiuj ili devos respondi), la Slovena Universitato verkos sciencan klarigon kaj didaktikajn instrukciojn por instruistoj, E@I kune kun Studio Gaus kreas paĝaron sur kiu eblos ricevi kaj uzi ĉion necesan kaj Izvori (eldonejo) el Zagreb eldonos papere la tutan materialon (lernolibreton en tri lingvoj), kaj la didaktikaĵojn kaj la instrukciojn por la instruistoj). La projekto estas tre postula, kaj pri ĝi devas okupiĝi aro da fakuloj pedagogiaj kaj informadikistaj.

Ĝi estis ĝustatempe transdonita kun altkvalifikitaj klarigoj (en la angla) kaj ni forte esperas ke ĝi estos aprobita, kion ni scios iam en somero. Se jes, oni aktivos ekde aŭtuno dum 26 postaj monatoj por realigi la planojn kaj tiam ni havos konkretan materialon kiun ni povos oferti al lernejoj en tuta Eŭropo. La projekton mem klare difinis kaj priskribis krom mi, ankaŭ Maja Cimerman kaj Jevgenij Gaus kun helpo de kelkaj aliaj kunlaborantoj.

Zlatko Tišljar

RELIGIA FORUMO DUM LA 101-A UK

Unu el malfermitaj fakaj aranĝoj de la 101-a UK, kiun Slovaka Esperanto-federacio (SKEF) organizas kun la civitana organizo Parlamento de Mondaj Religioj - Slovakio kaj Universitato de Konstateno Filozofa en Nitra, estas "Interreligia forumo en centra Eŭropo 2016".

Mi petis reprezentantojn de religiaj organizaĵoj registritaj ĉe UEA por proponi al 4 paneloj sian paneliston por kontribui al diskuto pri jenaj temoj:

- 1) Malriĉeco kaj malegaleco de enspezoj
- 2) Migrado kaj integriĝo
- 3) Paco kaj sekureco
- 4) Dialogo inter religioj: Pri kio? Kial? Kiel?

La Forumon partoprenos slovakiaj kaj eksterlandaj neesperantistoj kaj esperantistoj. Pro tio interpretado estos en tri laborlingvoj: la slovakaj, Esperanto kaj la angla. La organizantoj

supozas, ke la Forumon partoprenos ĉirkaŭ 200 partoprenantoj de kiuj estus duono esperantistoj. En ĉiu panelo estos 3 aŭ 4 panelistoj kaj unu interkonsentita kunreferanto de la publiko.

La Forumo estos senpage malfermita por ĉiuj partoprenantoj de la 101-a UK. Ne gravos, ĉu ili estas reprezentantoj de iu religia organizaĵo registrita ĉe UEA aŭ ne.

Jozef Reinart

KALENDARO DE ESPERANTAJ EVENTOJ EN POLLANDO 2016

| | | |
|---------------------|---|--|
| -3.1.2016 | JES - Junulara E-Semajno en Eger Hungario | Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl |
| 18.04. 2016 | Festivalo de Deklamata Poezio en Wrocław | Centro de Interkultura Edukado – Wrocław, Pola Esperanto-Asocio kaj Asocio de Malsupra Silezio WIDNOKRĄG |
| 22 - 24 04.2016 | Aranĝo „Verda Szczecin” | PEA, filio en Szczecin esperanto.szczecin.pl |
| 5 - 8 05.2016 | Interkultura Majrenedvuo en Wrocław | PEA, Centro de Interkultura Edukado – Wrocław, ILEI-PL |
| 5 - 8 05.2016 | Sveda Esperanto-kongreso en Gdańsk | http://esperantosverige.se/eventoj/svespkon-2016 , Sten Svenonius på 073 9718078. |
| 26 - 29 05.2016 | 35-a Tutpollanda Esperanto-Kongreso, Generala Kunsido de PEA en Łódź | Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio PEA filio en Łódź, rk-lodzo@wp.pl |
| 3 - 5. 06.2016 | Jubileaj 30-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo | Krakova Societo ESPERANTO |
| 14 - 25. 06.2016 | 38-a Ĉebalta Esperantista Printempo | PEA, filio en Gliwice stanislaw.mandrak@gmail.com |
| 19.06. 2016 | Internacia renkontiĝo sur la monto Granda Ĉantorio ĉe landlimo de PL - CZ en ĉeĥa turisma gastejo | Slovakaj, ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj www.esperanto.zanet.pl/cxantorio |
| 13 - 16. 07.2016 | Multgeneracia Vilaĝo - Esperanto dum Festivalo Haltejo Woodstock en Kostrzyn ĉe la rivero Odra | UEA, TEJO, Centro de Interkultura Edukado - Nowy śącz |
| 16 – 23. 07.2016 | 72-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Wrocław, Pollando | Tutmonda Eesperantista Junulara Organizo kaj Pola Esperanto-Junularo |
| 9 - 11. 09.2016 | Esperanto sur la strando - 2016 | Triurba Esperantista Asocio Torento en Sopot |
| 14-23.9. 2016 | 49-a Internacia Esperanto-Feriado | Silezia Esperanto Asocio pomer@wp.pl |

| | | |
|---|---|--|
| 23 – 25. 09.2016a | en Duszniki Zdrój 32-a Artaj Konfrontoj en Esperanto en Poznań (ARKONES) | www.arkones.org tobiasz@esenco.org, www.arkones.org/pl |
| 7 - 9. 10.2016 11 - 13. 11.2016 | 40-aj Jubileaj Preĝtagoj en Częstochowa Esperantista renkontiĝo GRUPE – 19 en Gliwice | Pola sekcio de IKUE pomer@wp.pl PEA, filio en Gliwice, stanislaw.mandrak@gmail.com m aŭ: staman@ka.onet.pl |
| 9-11 12.2016 28.12. 2016 – 4.01.2017 | Bjalistokaj Zamenhof Tagoj Junulara Esperanta Semajno JES - 2016 en Waldheim am Brahmsee en norda Germanio | Bjalistoka Esperanta Societo pwierzbowski@gmail.com Pola Esperanto-Junularo www.pej.pl http://jes.pej.pl/2016/ |



Kalendaron de E-eventoj en la tuta mondo vi trovas ĉe: <http://www.eventoj.hu/kalendaro.htm>

Robert Kamiński

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 31-an de marto 2016

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Sandra Schweder, Angelos Tsirim0okos, Karl Breuninger kaj Uli Ender, Jozef Reinbart, Szilvási László, Robert Kamiński.

Kontakto: ztisljar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

